

HENRIK IBSEN

PUPHEJMO

Dramo en tri aktoj

(Et Dukkehjem)

(1879)

Tradukis

Odd Tangerud

LINGVE KONTROLITA DE
ESPERANTISTA VERKISTA ASOCIO

(EVA)

Dua eldono

1998

Eldonejo: Jec Scandinavia a/s

Postboks 54, N - 3401 Lier

Tlf.. 32 85 50 03. Fax. 32 85 50 82

ISBN 82-991075-2-0

PUPHEJMO

Roloj:

- TORVALD HELMER, advokato
- NORA, lia edzino
- RANK, doktoro (kuracisto)
- KRISTINE LINDE, vidvino
- NILS KROGSTAD, juristo
- La tri malgrandaj infanoj de la familio Helmer
- ANNE-MARIE, infanvartistino
- HELENE, ĉambristino
- Portisto

(La agado havas lokon en la hejmo de la familio Helmer dum tri kristnaskaj tagoj. Kristnaska vespero, la 24-an de Decembro, komencas la festotagojn memore al la naskiĝo de la kristana profeto Jesuo Kristo. Ibsen uzas la antikvan skandinavan nomon “Julo” por tiu religia festo.)

UNUA AKTO

(Hejmeca kaj agrabla, sed ne lukse meblita ĉambro. Pordo dekstre en la fono kondukas al la antaŭĉambro; alia pordo maldekstre fone kondukas al la oficejo de *Helmer*. Inter tiuj pordoj estas piano. Meze de la maldekstra muro estas pordo, kaj pli antaŭe estas fenestro. Ĉe la fenestro estas ronda tablo kun brakseĝoj kaj malgranda sofo. Sur la dekstra muro, iom malantaŭe, estas pordo, kaj iom pli antaŭe estas kaŝela forno, apud kiu estas brakseĝoj kaj balanca seĝo. Inter la forno kaj la flanka pordo estas tableto. Kuprogravuraĵo sur la muro. Etaĝero kun porcelanaĵoj kaj aliaj malgrandaj artaĵoj; malgranda libroŝranko kun libroj lukse binditaj. Tapiŝo sur la planko; fajro en la forno. Vintrotago.)

(Oni sonorigas en la antaŭĉambro; poste oni aŭdas ke iu malfermas. *Nora* envenas, kontente kantetante; ŝi estas vestita elirveste kaj portas plurajn paketojn, kiujn ŝi metas sur la tablon dekstre. Ŝi lasas malferma la pordon post si, kaj oni vidas portiston, kiu portas Julpiceon kaj korbon, kiujn li donas al la ĉambristino, kiu malfermis por ili.)

NORA. Kaŝu bone la Jularbon, Helene. La infanoj nepre ne vidu ĝin antaŭ la vespero, kiam ĝi estos ornamita. (al la portisto; elprenante la monujon) Kiom —?

PORTISTO. Kvindek oerojn.

NORA. Jen unu krono. Ne! Vi prenu la tuton.

(La *portisto* dankas kaj foriras. *Nora* fermas la pordon. Ŝi daŭre ridas mallaŭte kaj kontente dum ŝi deprenas la supervestojn)

NORA (prenas papersaketon kun makaronoj el la poŝo kaj manĝas kelkajn; poste ŝi iras piedpinte kaj ŝtelaŭskultas ĉe la pordo de sia edzo). Jes, li estas hejme. (kantetas denove irante al la dekstra tablo)

HELMER (en sia ĉambro). Ĉu estas la alaŭdeto, kiu kvivitas tie?

NORA (malfermante kelkajn paketojn). Jes, estas.

HELMER. Ĉu estas la sciureto, kiu ĉirkaŭkuras tie?

NORA. Jes!

HELMER. Kiam revenis la sciureto!

NORA. Ĵus nun! (metas la saketon kun makaronoj en la poŝon, kaj viŝas sian buŝon) Venu, Torvald, kaj rigardu kion mi aĉetis.

HELMER. Ne ĝenu min! (iom poste; malfermas la pordon, rigardas, tenante plumon) Aĉetis, vi diras? Ĉion ĉi? Do mia disipa birdeto flirtis denove malŝparante monon!

NORA. Jes, sed, Torvald, ĉi-jare ni vere povas iom senbridiĝi. Estas ja la unua Julfestoj, kiam ni ne bezonas ŝpari.

HELMER. Nu, nu! Malŝpari ni ne povas.

NORA. Tamen, Torvald, iomete ni nun povas malŝpari, ĉu ne? Nur etan iometon. Vi ja ricevos grandan salajron kaj gajnos multe, multe da mono.

HELMER. Jes, ekde novjaro; sed poste pasos kvarona jaro antaŭ nova salajrodatoj.

NORA. Pa! Ni povas ja pruntepreni intertempe.

HELMER. Nora! (proksimigas sin al ŝi kaj ŝerce pinĉas ŝian oreleon) Ĉu estas la facilanimeco kiu denove ludas? Supozu ke mi hodiaŭ prunteprenis mil kronojn, kaj vi elspezis ilin dum la Julsemajno, kaj ke novjarvesperon tegolo trafis al mi la kapon, kaj jen finite pri mi —

NORA (kovras lian buŝon per sia mano). Ho fi! Ne parolu tiel malbele!

HELMER. Supozu ke io simila okazus, — kio poste?

NORA. Se io tiel terura okazus, estus tute egale por mi ĉu mi havus ŝuldojn aŭ ne.

HELMER. Nu, sed la personoj de kiuj mi pruntis?

NORA. Ili? Kiu zorgas pri ili? Ili estas ja fremduloj.

HELMER. Nora, Nora, vi estas virino! Tamen parolante serioze, Nora, vi scias, kion mi pensas tiurilate. Neniun ŝuldon! Neniam pruntepreni! Hejmo kiu fondiĝas sur ŝuldoj, fariĝos senlibera, do malbela. Ĝis nun ni du kune eltenis brave; kaj tion ni ankaŭ faros dum la mallonga tempo ankoraŭ necesa.

NORA (iras al la forno). Jes ja, kiel vi volas, Torvald.

HELMER (sekvas ŝin). Nu, nu; la kantalaŭdo ne trenu siajn flugilojn. Kio? Ĉu la sciureto staras tie paŭtante? (elprenas la monujon) Nora, divenu kion jen mi havas.

NORA (turnas sin rapide). Monon!

HELMER. Jen rigardu! (donas al ŝi kelkajn monbiletojn) Kara mia, certe mi scias, ke en hejmo dum la Jultempo oni multe bezonas.

NORA (kalkulas). Dek — dudek — tridek — kvardek. Ho, dankon, dankon, Torvald; tio helpos min longe.

HELMER. Jes, vere ĝi devus.

NORA. Jes, jes, vere helpos. Sed venu por ke mi montru al vi, kion mi aĉetis. Kaj kiom malmultekoste! Rigardu, novajn vestojn por Ivar — kaj sabron. Kaj jen ĉevalo kaj trumpeto por Bob. Kaj jen pupo kaj pupa lito por Emmy; estas simplaj; sed ŝi ja ĉiuokaze baldaŭ disŝiros ilin. Kaj jen robŝtofo kaj tukoj por la servistinoj; maljuna Anne-Marie devus ja havi multe pli.

HELMER. Kaj kio estas en jena paketo?

NORA (krias). Ne, Torvald, tiun vi nur rajtas vidi ĉi-vespere!

HELMER. Nu, tiel. Sed diru nun al mi, vi malŝparulineto, kion vi pensis por vi mem?

NORA. Pa! Por mi? Mi tute nenion deziras.

HELMER. Certe vi ion deziras. Menciu al mi ion moderan, kion vi pleje ŝatus havi.

NORA. Ne, mi vere ne scias. Ho jes, aŭdu, Torvald

HELMER. Nu?

NORA (palpante liajn butonojn; sen lin rigardi). Se vi volus doni ion al mi, vi povus —; povus —

HELMER. Nu, nu, eldiru.

NORA (rapide). Vi povus doni al mi monon, Torvald. Nur tiom kiom vi opinias, ke vi povas malhavi; kaj poste, iun tagon mi aĉetos ion.

HELMER. Sed vidu, Nora —

NORA. Ho jes, kara Torvald, faru; mi ege petas vin pri tio. Kaj mi pendigus sur la Jularbon la monon enpakitan en ora papero. Ĉu ne estus amuze?

HELMER. Kiel oni nomas tiujn birdetojn, kiuj ĉiam malŝparas monon?

NORA. Jes, jes, monludantojn; mi ja scias. Tamen ni faru kiel mi diras, Torvald; kaj mi havos tempon por pripensi kion mi pleje bezonas. Ĉu ne estas tre saĝe? Ĉu?

HELMER (ridetante). Certe estas; kondiĉe ke vi vere kapablus reteni la monon, kiun mi al vi donas, kaj vere aĉetus ion por vi mem. Sed foje ĝi malaperas en la mastrumado, kaj foje ĝi forflirtas por aliaj superflujaj aĉetoj, kaj jen mi devas denove elspezi.

NORA. Tamen, Torvald —

HELMER. Vi ne povas nei, mia kara Nonja. (metas la brakon ĉirkaŭ ŝian talion) La ludanta birdo estas dolĉa; sed ĝi forludas tre multe da mono. Estas nekredeble multekoste por edzo teni ludbirdon.

NORA. Fi, kial vi diras tion? Mi vere ŝparas ĉion, kion mi kapablas.

HELMER (ridetas). Jes, trafa diraĵo. Ĉion kion vi kapablas. Sed vi tute ne kapablas.

NORA (kantetas kaj ridetas silente kontenta). Mmm, se vi nur sciuz kiom da elspezoj ni alaŭdoj kaj sciuroj havas, Torvald.

HELMER. Vi estas stranga etulino. Tute sama kia estis via patro. Vi ĉirkaŭflaras ĉie por havigi al vi monon; sed tuj kiam vi havigis ĝin, ĝi kvazaŭ malaperas inter viaj manoj; vi neniam scias, kie vi elspezis la monon. Nu, oni devas akcepti vin, kia vi estas. Kuŝas en la sango. Ja, ja, ja, tio estas hereda, Nora.

NORA. Ha, mi dezirus, ke mi estus heredinta multajn el la kvalitoj de paĉjo.

HELMER. Kaj mi ne dezirus vin alia ol ĝuste kia vi estas, mia dolĉa, eta kantalaŭdo. Sed aŭskultu; suspekto sin prezentas. Vi aspektas hodiaŭ tiel — tiel — nu kiel mi nomu tion? — tiel ruzeta —

NORA. Mi, ĉu?

HELMER. Jes vere vi aspektas. Rigardu min fikse en la okulojn.

NORA (rigardas lin). Nu?

HELMER (minacas per la fingro). Ĉu eble la eta frandemulino ekscesis en la urbo hodiaŭ?

NORA. Ne, kial vi pensas tiel?

HELMER. Ĉu eble la frandemulino vere ne faris kromviziton al la sukeraĵisto?

NORA. Ne, mi certigas al vi, Torvald —

HELMER. Ne lipis iom da konfitaĵo?

NORA. Ne, tute ne.

HELMER. Eĉ ne gustumis makaronon aŭ du?

NORA. Ne, Torvald, mi vere certigas al vi —

HELMER. Nu, nu, nu; kompreneble mi nur ŝercas —

NORA (iras al la dekstra tablo). Mi vere ne ekpensus agi kontraŭe al vi.

HELMER. Ne, mi scias ja tion; kaj vi ja promesis al mi —. (proksimiĝas) Nu, tenu viajn etajn Julsekretojn por vi mem, mia kara Nora. Ili certe malkaŝiĝos en la vespero ĉe la eklumigita Jularbo.

NORA. Ĉu vi memoris inviti doktoron Rank?

HELMER. Ne. Sed ne estas necese; estas ja memkompreneble, ke li manĝos kune kun ni. Cetere mi invitos lin, kiam li alvenos antaŭtagmeze. Bonan vinon mi mendis. Nora, vi ne povas imagi kiom mi antaŭĝuas la vesperon.

NORA. Ankaŭ mi. Kaj kiom la infanoj ĝojegos, Torvald.

HELMER. Ho, estas grandioze pripensi, ke oni havas sekuran, solidan oficon; ke oni havas abundan enspezon. Estas ĝuiga penso, ĉu ne?

NORA. Ho jes, estas mirinde!

HELMER. Ĉu vi memoras pasintan Julon? Dum tutaj tri semajnoj antaŭe vi enfermis vin en via ĉambro ĉiun vesperon ĝis malfrue post meznokto por fari florojn por la Jularbo kaj ĉiujn aliajn mirindaĵojn, per kiuj vi volis surprizi nin. Hu, estis la plej enuiga tempo, kiun mi iam travivis.

NORA. Kontraŭe mi tute ne enuis.

HELMER (ridetante). Sed la rezulto estis milde dirite iom modesta, Nora.

NORA. Nu, nu; jen vi denove incitetas min pri tio. Ĉu mi kulpus pri tio, ke la kato envenis kaj disŝiris ĉion?

HELMER. Certe ne, mia kompatinda Nonja. Vi plej volonte emis ĝojigi nin ĉiujn, kaj tio estas la ĉefa afero. Sed estas bone, ke tiu tempo de malriĉeco estas pasinta.

NORA. Ho jes, estas vere ĝojige.

HELMER. Nun mi ne bezonas sidi ĉi tie sola kaj enui; kaj vi ne bezonas turmenti viajn benitajn okulojn kaj viajn etajn, delikatajn manojn —

NORA (manklakas). Ne, ĉu ne, Torvald, tion ni ne plu bezonas? Ho kiel mirinde bone estas tion aŭdi! (prenas lian brakon) Nun mi konfidu al vi kiel mi intencas ĉion aranĝi, Torvald. Tuj post la Jultagoj — (oni sonorigas) Ha! sonoras! (ordigas iom en la sidĉambro) Iu venos. Nu do, ĉagrene!

HELMER. Por vizitoj mi ne estas hejme; memoru tion.

ĈAMBRISTINO (ĉe la enireja pordo). Sinjorino, venas fremda virino —

NORA. Enlasu ŝin.

ĈAMBRISTINO (al *Helmer*). Kaj la doktoro venis samtempe.

HELMER. Li iris rekte en mian ĉambron, ĉu?

ĈAMBRISTINO. Jes, li tien iris.

(*Helmer* iras en sian ĉambron. La *ĉambristino* enlasas *sinjorinon Linde*, kiu estas vojaĝvestita, kaj fermas post ŝi)

LINDE (singena kaj iom hezitanta). Bonan tagon, Nora.

NORA (necerta). Bonan tagon —

LINDE. Vi eble ne rekonas min.

NORA. Ne; mi ne scias — nu jes, ŝajnas al mi — (ekkrias) Sed? — Kristine? Ĉu efektive estas vi?

LINDE. Jes, estas mi.

NORA. Kristine! Kaj mi kiu ne rekonis vin! Sed kiel do povis mi —? (iom malrapide)
Kiom vi aliiĝis, Kristine!

LINDE. Jes, verŝajne — aliiĝis. Dum naŭ — dek longaj jaroj —

NORA. Ĉu pasis tiom da tempo post kiam ni vidis unu la alian? Jes, vere ja estas. Ho, la ok lastaj jaroj estis feliĉega tempo, kredu. Kaj jen vi do venis ĉi tien en la urbon? Faris la longan vojaĝon dumvintre. Brava vi estas.

LINDE. Mi ĵus venis per la vaporŝipo matene.

NORA. Por amuziĝi dum la Julsemajno, kompreneble. Ho, kiom ĝuige! Jes, amuziĝi, tion ni vere faru. Sed deprenu viajn supervestojn. Vi ne frostas, ĉu? (helpas ŝin) Jen; nun ni sidigu nin agrable tie apud la forno. Ne, ne; tien en la brakseĝon! En la balanca seĝo mi volas sidi. (prenas ŝiajn manojn) Jes nun vi ree havas vian antaŭan vizaĝon; estis nur en la unua momento —. Iom pli pala vi fariĝis, Kristine, — kaj eble iom pli malgrasa.

LINDE. Kaj multe, multe pli maljuna, Nora.

NORA. Jes, eble iomete pli maljuna, iometete; tute ne multe. (haltas subite; serioze)
Ho, sed mi senpripensa homo, kiu sidas babilante! Dolĉa, benita Kristine, ĉu vi povas pardoni min?

LINDE. Pri kio vi pensas, Nora?

NORA (malrapide). Kompatinda Kristine, vi ja fariĝis vidvino.

LINDE. Jes, antaŭ tri jaroj.

NORA. Ho, mi tion ja sciis; mi legis pri tio en la gazetoj. Ho, Kristine, kredu min;
tiam mi ofte intencis skribi al vi; sed ĉiam mi prokrastis, kaj ĉiam io intervenis.

LINDE. Kara Nora, tion mi bone komprenas.

NORA. Estis ja malafable miaflanke, Kristine. Ho, kompatinda vi! Kiom vi travivis.
— Kaj li neniom postlasis por vin vivteni?

LINDE. Neniom.

NORA. Kaj neniujn infanojn?

LINDE. Neniujn.

NORA. Do vere nenion?

LINDE. Eĉ ne aflikton aŭ sopiron kiel etan konsolon.

NORA (rigardas ŝin dubeme). Tamen, Kristine, kiel tio eblas?

LINDE (ridetas afliktite, kaj tuŝas ŝiajn harojn). Nu, tio foje okazas, Nora.

NORA. Tute sola. Kiom terure peze por vi. Mi havas tri dolĉajn infanojn. Sed nun vi
ne povas vidi ilin, ĉar ili eliris kun la vartistino. Tamen, rakontu nun al mi, ĉion
—

LINDE. Ne, ne, ne, prefere rakontu vi.

NORA. Ne, vi komencu. Hodiaŭ mi ne volas esti egoisto. Hodiaŭ mi volas pensi nur
pri viaj aferoj. Tamen unu novaĵon mi devas diri al vi. Ĉu vi scias pri la granda
feliĉo, kiu okazis al ni laste?

LINDE. Ne. Kaj **kiu**?

NORA. Pensu, mia edzo nomiĝis direktoro de la Akciobanko!

LINDE. Via edzo? Ho kia ŝanco —!

NORA. Jes ja, ega! Nur esti advokato, tio ja ne estas firma vivtenado, precipe kiam oni ne volas okupi sin pri aliaj aferoj ol tiuj, kiuj estas honestaj kaj bontonaj. Kaj kompreneble Torvald neniam volis; kaj pri tio mi tute samopinias kun li. Ho, imagu kiom ni ĝojas! Li ekfunkcios en la banko jam de novjaro, kaj tiam li ricevos grandan salajron kaj multajn procentojn. De nun ni povas vivi tute alimaniere ol antaŭe, — ĝuste kiel ni deziras. Ho, Kristine, kiom mi sentas min ŝveba kaj feliĉa! Ĉar estas ja ĝuige havi multe da mono kaj ne bezoni maltrankviliĝi. Ĉu ne?

LINDE. Jes almenaŭ estus kontentige havi por la necesajtoj.

NORA. Ne, ne nur la necesan, sed ege, ege multe da mono!

LINDE (ridetas). Nora, Nora, ĉu vi ankoraŭ ne fariĝis saĝa? Dum la lernojaroj vi estis malŝparulino.

NORA (ridas mallaŭte). Jes, tion diras Torvald ankoraŭ. (minacas per la fingro) Sed “Nora, Nora” ne estas tiel stulta kiel vi pensas. — Ho, ne estis ĉiam por ni tiel, ke mi povus malŝpari. Ambaŭ devis ni labori!

LINDE. Ankaŭ vi?

NORA. Jes, pri malgravaĵoj; pinglolarbo, kroĉado, brodado kaj simile; (aspekte ion aludante) kaj ankaŭ pri aliaj aferoj. Vi certe scias, ke Torvald forlasis la ministerion, kiam ni geedziĝis? Ne estis ŝanco por promocio en lia oficejo, kaj li ja devis enspezi pli da mono ol antaŭe. Sed la unuan jaron li trostreĉis sin tiel terure. Li devis ja serĉi ĉiajn kromenspezojn, kiel vi certe povas kompreni, kaj labori de frue ĝis malfrue. Sed tion li ne eltenis, kaj li fariĝis morte malsana. Kaj jen la kuracistoj deklaris, ke necesas por li iri suden.

LINDE. Jes, vi restis en Italujo tutan jaron?

NORA. Vere jes, sed ne estis facile forvojaĝi, kredu min. Ivar estis tiam ĵus naskita. Foriri ni tamen devis, kompreneble. Ho, estis mirinde ĝuiga vojaĝo. Kaj ĝi savis la vivon de Torvald. Sed kostis tre multe da mono, Kristine.

LINDE. Tion mi ja komprenas.

NORA. Mil ducent talerojn ĝi kostis. Kvar mil okcent kronojn. Jen granda sumo.

LINDE. Jes, sed en tiaj situacioj estas granda feliĉo, ke oni havas la monon.

NORA. Jes, sciu, ni ricevis la sumon de paĉjo.

LINDE. Nu, tiel. Estis ja je tiu tempo ke via patro mortis, mi kredas.

NORA. Jes, Kristine. Kaj pensu, mi ne povis iri al li por lin varti. Ĉiun tagon mi atendadis, ke eta Ivar venos en la mondon. Kaj mi ankaŭ devis varti mian malfeliĉan, morte malsanan Torvald. Mia kara bona paĉjo! Mi ne plu vidis lin, Kristine. Estas la plej peza travivaĵo, kiun mi spertis, post kiam mi edziniĝis.

LINDE. Mi scias, ke vi multe amis lin. Sed jen vi do iris al Italujo?

NORA. Jes, ni havis ja la monon; kaj la kuracistoj urĝis nin. Do, ni forvojaĝis unu monaton poste.

LINDE. Kaj via edzo revenis tute sana?

NORA. Sana kiel fiŝo!

LINDE. Sed — la doktoro?

NORA. Kiel?

LINDE. Ŝajnas al mi, ke la ĉambristino diris, ke estas la doktoro, tiu sinjoro, kiu alvenis samtempe kun mi.

NORA. Nu! Tiu estas doktoro Rank; sed li ne venas por viziti pacienton; estas nia plej intima amiko, kaj li vizitas nin almenaŭ unu fojon tage. Ne, malsana Torvald ne estis post tiam, eĉ ne horon. Kaj la infanoj estas sanaj, kiel ankaŭ mi. (eksaltas kaj manfrapas) Ho Dio, ho Dio, Kristine, estas vere mirinde vivi kaj esti feliĉa! — — . Sed fi, estas abomene miaflanke —; mi ja nur priparolas miajn proprajn aferojn. (eksidas sur skabelon tute apud ŝi kaj metas la brakojn sur ŝian genuon) Ho, ne koleru kontraŭ mi! — Diru, ĉu efektive estas vero, ke vi ne amis vian edzon? Kial vi do akceptis lin?

LINDE. Mia patrino ankoraŭ vivis; sed ŝi kuŝis senhelpe malsana en la lito. Kaj mi devis ankaŭ zorgi pri miaj du pli junaj fratoj. Mi ne trovis, ke estas saĝe rifuzi lian edziĝpeton.

NORA. Ne, ne; eble vi pravas. Do tiam li estis riĉa?

LINDE. Li estis sufiĉe bonhava, mi opinias. Sed estis ne sekuraj aferoj, Nora. Kiam li mortis, ĉio perdiĝis, kaj nenio restis.

NORA. Kaj poste —?

LINDE. Nu, mi devis iel trati min pere de eta komerco kaj malgranda lernejo, kaj kion mi krome povis elpensi. La lastaj tri jaroj por mi estis seninterrompa, senripoza labortago. Nun ĝi atingis finon, Nora. Mia kompatinda patrino ne plu bezonas min, ĉar ŝi forpasis. Kaj nek la knaboj; ili havas oficojn kaj povas zorgi pri si mem.

NORA. Kiom vi devas senti vin senŝar —

LINDE. Ho ne! — nur tiom senmezure superflua. Neniun por kiu plu vivi. (ekstaras malkviete) Tial mi ne plu eltenis en tiu solecejo. En ĉi tiu urbo certe estas pli da eblecoj trovi ion, kio povas absorbi min kaj okupi miajn pensojn. Mi dezirus esti tiom feliĉa, ke mi trovus daŭran oficon, iun oficejan laboron —

NORA. Tamen, Kristine, tio estas terure streĉa, kaj vi aspektas sufiĉe streĉita antaŭe. Estus pli bone por vi veni al iu banloko.

LINDE (iras al la fenestro). Mi ne havas paĉjon, kiu povus doni al mi vojaĝmonon, Nora.

NORA (ekstaras). Ho, ne koleru kontraŭ mi.

LINDE (pli proksime). Kara Nora, nun vi ne koleru kontraŭ mi. La plej malbona en situacio kia la mia, estas ke ĝi kaŭzas tiom da amareco en la animo. Oni havas neniun por kiu labori; sed tamen oni devas eltrovi eblecojn ĉiuloke. Oni devas ja vivi; kaj sekve oni fariĝas egoisto. Kiam vi rakontis pri la feliĉa ŝanĝo en via situacio — kedu — mi ne tiom ĝojiĝis pro vi, kiom pro mi mem.

NORA. Kiel tio? Ho, nun mi komprenas. Vi opinias, ke eble Torvald povus fari ion por vi.

LINDE. Jes, tion mi pensis.

NORA. Li faru, Kristine. Lasu tion al mi; mi enkondukos la aferon tiel lerte, lerte, eltrovos ion afablan, kion li multe ŝatas. Ho, mi tre ŝatus esti helpa al vi.

LINDE. Kiel afabla vi estas, Nora, ke vi tiom fervoras por mia afero, — duoble afable de vi, kiu mem spertis tiom malmulte de la elprovoj kaj problemoj de la vivo.

NORA. Mi —? Mi spertis malmulte, —?

LINDE (ridetante). Nu Dio mia, tiometan pinglolaron kaj tiaĵojn —. Vi estas infano, Nora.

NORA (rektigas la kapon kaj iras plankmezen). Tion vi ne diru tiel arogante.

LINDE. Nu —?

NORA. Vi estas egala al la aliaj. Vi ĉiuj opinias, ke mi taŭgas al nenio grava —

LINDE. Nu, nu —

NORA. — ke mi elprovis nenion en ĉi tiu malfacila mondo.

LINDE. Kara Nora, vi ja ĵus rakontis al mi ĉiujn viajn travivaĵojn.

NORA. Pa, — tiujn bagatelojn! (mallaŭte) Mi ne rakontis pri mia granda ago.

LINDE. Kiu granda ago? Al kio vi aludas?

NORA. Vi ignoras min tute, Kristine; sed tion vi ne devus fari. Vi fieras, ke vi laboris tiel streĉe kaj longe por via patrino.

LINDE. Mi vere neniun ignoras. Sed tio estas vero: mi estas fieraj kaj ĝojaj, kiam mi pensas, ke ebligis al mi fari la lastan vivtempon de mia patrino tiel senzorga.

NORA. Kaj vi ankaŭ estas fieraj, kiam vi pensas pri via helpo al viaj fratoj.

LINDE. Mi trovas ke tion mi rajtas.

NORA. Tion ankaŭ mi trovas. Sed nun vi aŭdu ion, Kristine. Ankaŭ mi havas kaŭzon por esti fieraj kaj ĝojaj.

LINDE. Mi ne dubas. Sed al kio vi aludas?

NORA. Parolu mallaŭte. Se Torvald aŭdus, jen imagu! Li devas por neniuj prezoj en la mondo —; neniuj devas scii, Kristine; neniuj krom vi.

LINDE. Sed kio do estas?

NORA. Venu ĉi tien (tiras ŝin sur la sofion flanke de si) Aŭdu, — ankaŭ mi havas kaŭzon por esti fieraj kaj ĝojaj. Estas mi, kiu savis la vivon de Torvald.

LINDE. Savis —? Kiel savis?

NORA. Mi ja rakontis al vi pri la vojaĝo al Italujo. Torvald ne travivus, se li ne estus veninta tien —

LINDE. Jes ja, via patro donis al vi la necesan monon —

NORA (ridetas). Jes, tion kredas Torvald kaj ĉiuj aliaj; sed —

LINDE. Sed —?

NORA. Paĉjo donis al ni eĉ ne unu ŝilingon. Estis mi, kiu havigis al ni la monon.

LINDE. Vi? La tutan grandan sumon?

NORA. Mil ducent talerojn. Kvar mil ok cent kronojn. Jen, kion vi diras?

LINDE. Jes sed, Nora, kiel eblis? Ĉu vi gajnis en la loterio?

NORA (malestime). En la loterio? (siblas) Kia lerteco estus tio?

LINDE. Sed de kie vi ricevis ĝin?

NORA (kantetas kaj ridetas mistere). Hm; tra la la la!

LINDE. Ĉar pruntepreni vi ja ne povis.

NORA. Nu? Kial ne?

LINDE. Ne, edzino ne rajtas pruntepreni sen la konsento de la edzo.

NORA (ĵetskuas la kapon). Nu, kiam estas edzino, kiu iom taŭgas pri negocaj aferoj, — edzino kiu scias iom saĝe aranĝi, kaj —

LINDE. Sed Nora, mi tute ne komprenas —

NORA. Vi tion ankaŭ ne bezonas. Eble mi ne **prunteprenis** la monon. Eblus havigi ĝin alimaniere. (ĵetas sin malantaŭen en la sofo) Eble mi ricevis ĝin de iu adoranto. Kiam oni estas tiel alloga, kiel mi —

LINDE. Facilanima vi estas.

NORA. Nun vi verŝajne estas senmezure scivolema, Kristine.

LINDE. Jes, aŭdu nun, kara Nora, — ĉu vi ne agis malprudente?

NORA (eksidas rekte denove). Ĉu estas malprudente savi la vivon de sia edzo?

LINDE. Mi opinias, ke estas malprudente, ke vi sen lia scio —

NORA. Sed ĝuste li devis ja nepre nenion scii! Je Dio, ĉu vi ne komprenas tion? Li eĉ ne devus scii kiom danĝere estas pri si. Ja al mi la kuracistoj venis kaj diris, ke lia vivo estas en danĝero; ke nenio alia povus savi lin krom restado en suda lando. Jen komprenu, ke unue mi devis provi palpe serĉi la vojon. Mi prezentis al li kiel bone estus por mi kiel por aliaj junaj edzinoj vojaĝi eksterlanden; mi ploris kaj petis; mi diris ke li absolute devus pripensi la cirkonstancojn en kiuj mi estas, kaj ke li devus esti ĝentila kaj cedi al mi; kaj jen mi sugestis ke li povus pruntepreni sumon. Sed tiam li fariĝis preskaŭ kolera, Kristine. Li diris, ke mi estas facilanima, kaj ke estas lia devo kiel edzo ne cedi al tiaj kapricoj kaj ideoj — kiel li nomis ilin. Nu ja, mi pensis, savota vi estu; kaj tiam mi trovis rimedon —

LINDE. Kaj via edzo, ĉu li ne sciigis de via patro, ke la mono ne venis de li?

NORA. Ne, neniam. Paĉjo mortis ĝuste en tiuj tagoj. Mi intencis informi lin pri la afero kaj peti lin nenion malkaŝi. Sed ĉar li kuŝis malsana —. Bedaŭrinde, ne fariĝis necese.

LINDE. Kaj vi neniam poste konfidis v